

# GDAŃSK



ESPERANTO

GDAŃSK

www.gdansk.pl










## Gdańsk

La gotika brikmasivo de Baziliko al S-ta Maria superiĝanta la urbon, Longa Foirejo – unu el la plej belaj placoj en Eŭropo, kiun ĉirkaŭas vico da riĉaj fasadoj de renesancaj brikdomoj, kun centre reganta statuo de Neptuno, malnova mezepoka Gruo (havena argano), dormetanta ĉe bordo de la rivero Motława – jen estas popularaj simboloj de Gdańsk. Ĉebalta miljara urbo, hejmlando de Hevelius, Fahrenheit, Schopenhauer, Grass kaj Wałęsa brilas en listo de la plej interesaj turistaj atrakciaĵoj.Gdańsk surprizas per multnombraj antikvaĵoj de arkitekturo burĝa, religia, milita kaj havena. La urbo imponas per heredaĵo de cento da jarcentoj de fascina kulturo kaj tempestema historio, kaj ankaŭ per escepta etoso de la loko, kie pasinteco kaj nuntempo plenharmonie kreas neripeteblan pejzaĝon.



**Reĝa Vojo**

Gdańsk multfoje havis la honoron gastigi monarkojn de Pollando. La 8-an de julio 1552 j. alvenis ĉi-tien la reĝo Sigismundo Aŭgusto kun dumila sekvantaro; la 1-an de aŭgusto 1677 j. pompe alvenis la urbon la reĝo Johano III Sobieski kun sia edzino Marinjo kaj filo Jakobo.







**Granda Arsenalo**

Situanta ĉe la Granda Arsenalo puteto, kiu servis por suprenlevi la kanonkuglojn el la kelo, estis projektita forme de antikva templeto, tegmentita per kupolo.




## Altaĵa Pordego (1)

Tiu riĉe skulptita la XVI-jarcenta ŝtona pordego al Gdańsk indikas komencon de la Reĝa Vojo. Alvenantajn altestimulojn krom la vivukriantaj gdanskanoj bonvenigis la blazonoj de Pollando, Gdańsk kaj la Reĝa Pruslando (t.e. Gdanska Pomerio kaj Ĥelma Lando), kune kun la didaktika epigrafo: "Justeco kaj pieco estas du fundamentoj de ĉiuj reĝlandoj.


## Antaŭpordegejo al la strato Longa (2)

Gotika kaj renesanca komplekso de la Antaŭpordegejo estis iam elemento de mezepokaj fortikaĵoj de la urbo. Starigita kvazaŭ averte, ĝi konsistas el la Ekzekutejo kun restajoj de pilorio, loko de publikaj ekzekutoj kaj la Mallibereja Turo, kiu dum periodo de la XVII ĝis XIX jarcentoj servis kiel urba malliberejo. En la historiaj ĉeloj, memorantaj ĝemojn de kondamnitoj, troviĝas nuntempe la trezoroj de "gdanska oro" – altvalora kolekto de la Sukcena Muzeo.

## Granda Arsenalo (3)

Situanta proksime la impona kaj dekoracia arsenaldomego estas la plej bona ekzemplo de la nederlanda manierarto en Gdańsk. Riĉe ornamitaj du samrangaj fasadoj, flanke de la Karba Foirejo kaj de la strato Teksista, ravas per siaj kompozicio kaj ornamarto. Iam majestaj internoj estis plenigitaj de kanonoj, kanonkugloj kaj diversspecaj armiloj. Hodiaŭ en la teretaĝo troviĝas komerca centro kaj en pliaj etaĝoj troviĝas la Akademio de Belartoj.












**Kortego de la Frataro de S-ta Georgo (4)**

La plej malnova en mezepoka Gdańsk pafista klubo de S-ta Georgo komence renkontiĝadis en la Kortego de Artus. Ĝia propra malfrugotika Kortego (t.n. Pafejo), en laŭmoda tiutempe en la urbo flamanda stilo, estis konstruita flanke de la Ora Pordego en la jaroj 1487-1494.




**Domo de Uphagen**

La 1-an de novembro 1911 j. en luita de lia familio, antaŭa domo de Johann Uphagen ĉe la strato Longa kun n-ro 12, estis malfermita la Muzeo de Burĝaj Internoj. Ĝis la jaro 1945 ĝi funkciis kiel filio de la Urba Muzeo.

Domo de Uphagen






## Ora Pordego (5)

Konstruita komence de la XVII jarcento grandioza triumfa arkaĵo kun du etaĝoj da kolonoj kondukis al la reprezenta strato Longa. Ĝin trapasis veturantaj iam al Gdańsk reĝaj kavalkadoj. Supron de la pordego kronas ŝtonaj statuoj, kiuj simboligas ŝatatajn de gdanskanoj dum jarcentoj valorojn: pacon, liberecon, riĉecon, famecon, konkordon, justecon, piecon kaj prudentecon. Ĉe la strato Longa loĝis riĉaj, influpovaj gdanskaj gentoj. La hodiaŭa populara promenejo kondukas laŭlonge de patriciaj domoj kun imponaj fasadoj konkurantaj unu kun la alia per riĉeco de formoj kaj originaleco de ornamaĵo.

## Domo de Uphagen (6)

Situita ĉe la strato Longa parte rokoka kaj parte klasikisma domo estis iam sidejo de la eminenta urba konsilanto kaj skabeno Johann Uphagen. Nuntempe troviĝas tie la Muzeo de Burĝaj Internoj, en kiu oni povas admiri plenpompan ornamaĵon kaj riĉan tiaman enhavaĵon de burĝa domo. Promeno en rekreitaj kun pietismo internoj de vestiblo, granda kaj malgranda manĝejoj, muzikĉambro, kuirejo translokas vizitantojn en la finan periodon de la XVIII-a jarcento.





**Urbodomo de la Ĉefa Urbo**

La 3-an de oktobro 1556 j. la turo kaj la interno de la Urbodomo de la Ĉefa Urbo estis detruitaj en brulego. Internoj de la Urbodomo estis rekonstruitaj en la renesanca stilo. En la jaro 1561 la turo estis pintigita per helmo kun figuro de la reĝo Sigismundo II Aŭgusto supre kaj ricevis novan horloĝon kaj 14-sonorilan karilonon.

HISTORIA MUZEO DE LA URBO GDAŃSK






## Urbodomo de la Ĉefa Urbo (7)

Iama sidejo de aŭtoritatoj de bonstata kaj potenca Gdańsk estis konstruita fine de la XIII-a jarcento kaj dum pluaj jaroj estis multfoje rekonstruata. Ĝia ekstera arkitekturo kaj internoj aranĝitaj en stilo de la Nederlanda Manierismo estiminde reprezentis la riĉecon kaj pozicion de la urbo. La plej majesta – la Granda Konsilantarsalono, nomata ankaŭ la Ruĝa Salonego, estas aprobata kiel unu el la plej belaj moderntempaj urbodomaj internoj. Ĝian plafonon ornamas 25 simbolaj pentraĵoj de Izaak van den Blocke. La plej fama el ili estas la „Gdanska Apoteozo". En la urbodoma turo troviĝas karilono, repliko de la XVII-jarcenta instrumento. La muziko de sonoriloj disvastiĝas malproksimen en la urbon. Nuntempe en antikvaj muroj troviĝas la Gdanska Historia Muzeo.







# Fontano de Neptuno

**Fontano de Neptuno**

La 9-an de oktobro 1633 j., apud la Kortego de Artus, la unuan fojon estis funkciigita fontano kun la skulptaĵo de Neptuno. Ĝi funkciis de printempo ĝis aŭtuno laŭ fiksitaj de la Urba Konsilantaro tagoj kaj horoj.





## Fontano de Neptuno (8)


Situita ĉe la Longa Foirejo la XVII-jarcenta Fontano de Neptuno estas simbolo de kuniĝo de Gdańsk kun la maro kaj la ĉarma ornamaĵo de la plej bela urba foirejo.Laŭ unu el la lokaj legendoj ĵus Neptuno kunagis ĉe la ekesto de la fama gdanska likvoro "Goldwasser" (Ora akvo). Indignita, ke en la fontanon vizitantoj ĵetas monerojn, li frapis akvon per sia tridento kaj disrompis oron en etajn floketojn, kiuj de tiu tempo ornamas per sia brilo la bonegan herban likvoron.







Kortego de Artus



**Kortego de Artus**

**La 23-an de no**vembro 1742 j. en la **Kortego de Artu**s estis malfermita la **grena borso, fun**kciinta tie ĝis 1920 j.

**Nova Domo de Ĵurio**

La 16-an de novembro 1901 j. en teretaĝo de la Nova Domo de Ĵurio ĉe la Longa Foirejo kun n-ro 43 okazis malfermo de ekspozicio titolita la „Gdanska Vestiblo". La ekspozicio konsistis el pli ol ducent da eksponajoj donacitaj de Lesser Giełdziński.




## Kortego de Artus (9)


La ideo, kiu inspiris konstruadon de tiu kortego, rilatis al la legenda Reĝo Arturo kaj la Ronda Tablo de Kavaliroj. La konstruaĵo servis kiel la reprezenta sidejo de komercistaj gildoj (t.n. benkoj), riĉa patriciaro kaj metiistoj. Danke al tio ĝi estis grava centro de la societa kaj komerca vivo en praa Gdańsk. Kunvenojn de gdanskanoj patronis imponaj gdanskaj leonoj tenantaj urban blazonon, protektanto de komercistoj Merkuro, personigoj de Justeco kaj Forto kune kun malavara Fortuno. Interna ornamaĵo de la Kortego pliriĉiĝas multaj pentraĵoj, modeloj de ŝipoj, murtegaĵoj, ŝirmarmiloj kaj la plej granda (pli ol 10 m alta) forno en la mondo. Ĝiaj kaheloj prezentas portretojn de tiamaj eminentaj eŭropaj regantoj, blazonojn kaj ankaŭ personigojn de virtoj kaj planedoj.

## Nova Domo de Ĵurio (10)

Najbare al la Kortego de Artus staras la Nova Domo de Ĵurio. Ĝiaj internoj – t.n. la Gdanska Vestiblo servis tiam kiel reprezenta baroka patricia salono plenigita de gdanska kaj nederlanda metio. Ĉiutage je la 13-a horo el la fenestro de la Nova Domo de Ĵurio vidiĝas belega fraŭlino Hedviga – gdanska XVII-jarcenta burĝino, malliberigita tie de sia onklo. En la jaro 1891 la knabino, heroino de la malnova romanco, fariĝis modelo de novela versio sub la titolo "Fraŭlineto en la Fenestreto" de Jadwiga Łuszczewska (Deotyma). Generacioj post generacioj da poloj legadis tiun romanon, por ke dum posta ĉeesto en Gdańsk trovi la priskribitan domon kaj la ĉarman fraŭlinon vidiĝantan en la fenestro.









**Ora Domo**

Skulptaj ornamaĵoj menditaj en Italio kaj transportitaj per ŝipo estis destinitaj por la fronta fasado de la Ora Domo. Malfeliĉe skulptaĵoj survoje al Gdańsk dronis kune kun la ŝipo. La fasado estis ornamita kun la pecoj por la malantaŭa fasado.

**Verda Pordego**

Antaŭ starigo de la reprezenta Verda Pordego, en tiu-ĉi loko ekzistis la plej malnova gdanska Pordego de Kogao. La 17-an de septembro 1880 j. en muroj de la Verda Pordego inaŭguris sian agadon la Okcidentprusa Provinca Muzeo.





## Ora Domo (11)

Alia same konata rezidejo vizaĝas la Longan Foirejon. La Ora Domo estas unu el la plej belaj konstruaĵoj en Gdańsk. Ĝi estis konstruita por la urbestro Jan Speymann, riĉa komercisto kaj klera mecenato de artoj kaj lia edzino Judita de Bahr komence de la XVII-a jarcento laŭ la projekto de Abraham van den Block. Legendo diras, ke de tempo al tempo en la koridoroj de la domo aperas fantomo de la bela Judita Speymann murmuretanta: „Agu juste, neniun ne timu".

## Verda Pordego (12)

Konstruita en la jaroj 1568-1571 en la manierisma stilo de Regnier el Amsterdamo kaj de Hans Kramer el Dresdeno. La pordego estis destinita por la sidejo de monarkoj vizitantaj la urbon. Tiun funkcion ĝi plenumis nur unufoje, kiam en la jaro 1646 haltiĝis ĉi-tie dum mallonga tempo Marie Louise Gonzaga dumvoje el Francio por edziĝi al Ladislao IV. Nuntempe, administrata de la Nacia Muzeo, la pordego estas loko de oftaj ekspozicioj. Troviĝas ankaŭ ĉi-tie la oficejo de Lech Wałęsa, laŭreato de la Paca Nobelpremio kaj la unua prezidanto de la Tria Pola Respubliko.








**Preĝejo al S-ta Maria**

La 28-an de julio 1502 j. estis finita la konstruado de la Preĝejo al S-ta Maria en Gdańsk. Ĝi daŭris ekde la jaro 1343. Granda unikaĵo de tiu preĝejo estas impona astronomia horloĝo, farita en la jaroj 1464-1470 de Hans Düringer. Ĝi montras horojn, tagojn, datojn de la ŝanĝemaj festoj kaj fazojn de la luno. Tagmeze aperas en ĝi la Tri Reĝoj, Apostoloj, la personoj de Adamo kaj Eva kaj personigo de la Morto.




## Preĝejo al la Plejsankta Virgulino Maria (13)

Konstruata pli longe ol unu kaj duono da jarcento la Baziliko al S-ta Maria estas la plej granda brika templo en Eŭropo. Ĝiaj gotikaj internoj kun escepte bela kristala volbo ampleksas multajn altnivelajn kreitaĵojn de la mezepoka kaj baroka artoj, i.a. superabundan ĉefan altaron de la majstro Mikaelo Schwarz el Augsburg, kortuŝitan ŝtonan Pieton el ĉirkaŭ 1410 jaro, kopion de la triptiko de Hans Memling la „Lasta Juĝo", fame konatan astronomian horloĝon. Bonega akustiko de la severaj, asketaj muroj de la preĝejo eksponas belan sonon de la impona baroka orgeno. El galerieto de la impona sonorila turo 82 metrojn alta, kies karakteriza silueto kun plata tegmento fiere leviĝas super Gdańsk, etendiĝas grandioza panoramo de la urbo. Al ĝi gvidas preskaŭ 400 ŝtupoj. Apude, en ombro de la Baziliko, aperas la baroka Reĝa Kapelo (14) kun originala fasado kaj karakterizaj tri kupoloj, fondita de la pola reĝo Johano III Sobieski.





**Strato Mariacka**

La ĉarmoplena strato Mariacka plurfoje estis loko por filmi. Ĉi-tie i.a. oni filmis la scenojn „Lubeck" en la filmo „Buddenbrok" laŭ Thomas Mann.






## Strato Mariacka

La senbrua strateto ekde jarcentoj altiranta artistojn, fascinas per ĝia romantismo. Stratangulo, gvidanta de la preĝejo de S-ta Maria al la Longa Riverbordo, fermita per la mezepoka Mariacka Pordego, estas bonega ekzemplo de iamaj gdanskaj konstruaĵoj kun karakterizaj antaŭpordoj kaj kun mallarĝaj, riĉe ornamitaj fasadoj de ŝtondomoj, kies tiamaj posedantoj estis riĉaj komercistoj kaj oraĵistoj. Nuntempe ĉe la strato Mariacka regas juvelejoj kaj galerioj kun unika sukcena juvelaro. Gdańsk observas multjarcentajn tradiciojn kiel la monda ĉefurbo de sukceno.



**Preĝejo al S-ta Nikolao**

La 10-an de oktobro 1813 j. estis bruligita la dominikana klostro apud la preĝejo al S-ta Nikolao pro atako de rusaj kanonaj obusoj. Post la senminigo placo servis por militistara ekzercado kaj pli poste kiel foirejo (la Dominikana Placo).






**Preĝejo al S-ta Katarina**

La 30-an de novembro 1738 j, sur la turo de la preĝejo al S-ta Katarina estis instalita, farita en Nederlando, karilono kun 37 sonoriloj. Ĝi forbrulis la 3-an de julio 1905 j, kaj „revenis" en la jaro 1999 en la formo de repliko. Tiun instrumenton ludas virtuozoj el la tuta Eŭropo dum ĉiujara Gdanska Karilona Festivalo.





## Preĝejo al S-ta Nikolao (15)

La plej malnova gdanska preĝejo, kies radikoj atingas la XII-an jarcenton, sortodestine kiel unuнura ne ruinigita transdaŭris la militajn tumultojn. La trinava gotika templo fascinas per escepte riĉa interna ornamaĵo el la XVII-a jarcento kaj per malfrua baroko de la altnivela orgena prospekto. Ekde jarcentoj la preĝejo apartenas al la Ordeno de Dominikanoj, kiujn venigis al Gdańsk la princo Świętopełk. En la jaro 1260 la papo Aleksandro IV donis al Dominikanoj la privilegion de indulgenco, kiu komencis la tradicion de la foiro de Sankta Dominiko – la plej populara gdanska aranĝo, kiu okazas ĝis nun kaj estas konata en la tuta Eŭropo.

## Preĝejo al S-ta Katarina (16)

La komencoj de la paroĥa preĝejo, la plej malnova de la Malnova Urbo, atingas la XIII-an jarcenton. Ĝian internon ornamas pentraĵoj de Anton Möller kaj Izaak van den Blocke. Ĉi-tie ankaŭ troviĝas epitafo kaj tomboŝtono de la fame konata astronomo Johano Hevelius. Sur la preĝeja turo, 76 metrojn alta, estas instalita karilono, repliko de la XVI-jarcenta instrumento. Ornamanta la turon bela helmo, laŭ la projekto de Jacob van den Blocke, jam de malproksime altiras la rigardon kaj estas nomata „krono de la urbo". Apud la preĝejo al S-ta Katarina sian sanktejon havas ankaŭ alia sanktulino; devenanta el la intertempo de la XIV-a kaj XV-a jarcentoj – la preĝejo al S-ta Brigita (17). Ĝi eniris la historion aŭguste de la 1980 j, dum la laboristaj strikoj kiel infuĝejo kaj loko por renkontoj de la kontraŭkomunista opozicio. Nuntempe oni starigas ĉi-tie grandiozan sukcenan altaron. Vizitante gdanskajn gotikajn preĝejojn valoras ankaŭ direktiĝi al la preĝejoj: al S-ta Johano (18), al S-ta Elizabeta (19), al S-ta Jozefo (20), al S-taj Petro kaj Paŭlo (21) kaj al. la franciskana trinava S-ta Triunuo (22) kun belaj gabloj.









## Nacia Muzeo

Famaj gdanskaj mebloj antaŭlonge altiradis al la urbo amasojn da klientoj. Mebloartistoj, rilate al la plej bonaj modeloj de la nederlanda mebloarto, prilaboris propran "gdanskan stilon". Ili rivalis en sia arto. El la ligno de la plej bona kvalito gdanskaj meblistoj faris tablojn, skribotablojn, litojn, ŝrankojn kaj horloĝajn ŝranketojn, bufedojn, kabinetojn entute riĉe ornamitajn, vestiblojn de ŝtondometoj kun bela torda ŝtuparo. Multaj tiuj mebloj estis ornamo de la reĝaj kortegoj. La kolekton de gdanskaj mebloj posedas la Sekcio de Malnova Arto de la Nacia Muzeo.

MUZEUM NARODOWE GDAŃSK



nadbałtyckie centrum kultury

## Urbodomo de la Malnova Urbo

Unua urbodomo de la Malnova Urbo ekzistis jam en la jaro 1382. Nuntempa urbodomo estis konstruita samloke en la jaroj 1587-1595



## Nacia Muzeo (23)

Alĝustigitan gotikan konstruaĵon de la eksa franciskana klostro, najbara al la preĝejo al S-ta Triunuo, administras la Sekcio de Malnova Arto de la Nacia Muzeo. La kolekto enhavas verkojn de la pentroarto flamanda, pola kaj gdanska, gdanskajn kaj nordeŭropajn meblojn, ceramikaĵojn, artobiektojn el oro kaj stano kaj la forĝistajn artverkojn. Sendube la plej konata eksponaĵo de la muzeo estas fama triptiko de Hans Memling „La Lasta Juĝo", konsiderata la plej grandioza lia artverko. La pentraĵo estis forrabita kaj poste donacita al la preĝejo de S-ta Maria en la XV-a jarcento de la gdanska kaporisto, kapitano Paul Benecke. Aliajn trezorojn de la muzeo oni povas admiri ankaŭ en la Palaco de Abatoj kaj en la Abata Grenejo en Gdańsk Oliwa.

## Urbodomo de la Malnova Urbo (24)

Pitoreska, delikata, brika konstruaĵo, pintigita kun gracia tureto, estas bonega, la plej nederlanda ekzemplo de manierismo en arkitekturo de la urbo. Ĝi rememorigas la gdanskan historian fenomenon: en malnovaj tempoj en Gdańsk ekzistis du centroj, ĉiu kun sia registaro - kaj pro tio ankaŭ du urbodomoj, unu por la Malnova Urbo kaj la dua por la Ĉefa Urbo. Jen en la Urbodomo de la Malnova Urbo laboris la fama astronomo kaj bierproduktisto Johano Hevelius, komence kiel skabeno kaj poste kiel urba konsilano. Krom interesaj internoj de la objekto, grandioza XVII-jarcenta plafono kun alegoriaj pentraĵoj, bela torda ŝtuparo, atenton turnas la ŝtona ĉefa portalo ornamita kun personigoj de malvirtoj kurbigitaj en grimaco kaj de ridetantaj virtoj. Nuntempe en la urbodomo troviĝas la Ĉebalta Centro de Kulturo en Gdańsk.






**Granda Muelejo**

Kanalo de la rivero Radunia trančanta la Malnovan Urbon estis fonto de energio profituzata jam en mezepoko por necesoj de industrio. Sur insuleto en disbranĉiĝo de la kanalo estis konstruita en la jaro 1350 la Granda Muelejo - la plej granda industria objekto en la mezepoka Eŭropo.



## Granda Muelejo (25)

Escepta objekto de la mezepoka teknika arkitekturo kun grandega duflanke dekliva tegmento, konstruita en la Malnova Urbo sur la kanalo de Radunia, estis la plej granda industria investaĵo de tiama Eŭropo. Ĝi plenumis funkciojn de muelilo, grenejo kaj bakejo. Nun en ĝiaj gotikaj internoj, kie oni povas ankoraŭ ekvidi grandajn radojn, funkcias komerca centro.





**Gruo**

Ligna konstruaĵo de gigantaj tamburoj de la Gruo, movata per forto de homoj, kun helpo de supra levilo, ebligis suprenlevi ŝarĝon ĝis du tunoj al alteco de 27 m. Malsupra levilo kune kun la supra levis kvartunan ŝarĝon al alteco de 11 m.



## Gruo (26)

Situita ĉe la rivero Motława estas la plej karakteriza antikvaĵo, senerara simbolo de Gdańsk, la plej granda havena gruo de mezepoka Eŭropo. Ĝin oni uzadis al transigo de ŝarĝoj kaj starigo de mastoj sur ŝipojn kaj samtempe ĝi estis urba pordego havanta netipan arkitekturon. En ĝia interno estas rekonstruita, ankaŭ nun funkcianta moviga mekanismo - giganta ligna rado movata iam per forto de homaj piedoj. Nun la majesta Gruo, kiel perfekta ekzemplo de havena konstruaĵo, estas bonega enkadrigo por riĉaj kolektoj de la Nacia Mara Muzeo (27), kiuj okupas ankaŭ la antikvaj grenejoj situitaj vid-al-vide - sur la alia bordo de la rivero Motława, sur la Plumba Insulo.






**Lumturo**

La Lumturo havis interne raran instrumenton: sferon de tempo. Ĝia levigo kaj mallevigo en ĉiu tagmezo ebligis al kapitanoj de ŝipoj precize reguli kronometrojn.

Lumturo

Fortreso Vistulenfluejo

**Fortreso Vistulenfluejo**

La Fortreso Vistulenfluejo evoluis de la ligna gardoturo konstruita ĉe la enfluejo de Vistulo de la Teŭtonaj Kruckavaliroj en la jaroj 1379-1382. La fortreso estis konstruata etape. En unua etapo (1482 j.) oni konstruis la rondan Turon Lanternon, kiu funkciis kiel lumturo.




## Lumturo (28)

Ankaŭ maran econ donas al Gdańsk la lumturo situita en la kvartalo nomita Nova Haveno. Konstruita fine de la XIX-a jarcento, ĝi estas unu el la plej belaj lumturoj ĉe la Balta Maro. Ĝi plenumis ankaŭ funkcion de turo de pilotoj kaj enhavis malordinaran en tiu tempo instrumenton: sferon de tempo. Nun en ĝia interno oni povas admiri kolekton de antikva optika instrumentaro kaj la ekspozicion montrantan historion de marbordaj lumturoj.. El pinto de la lumturo oni povas vidi vastan panoramon de la Gdanska Golfo kaj haveno, kaj ankaŭ ĝian kelkjarcentan „ĝemelan" Turon-Lanternon de la Fortreso Vistulenfluejo.

## Fortreso Vistulenfluejo (29)

Komenco de tiu unu el la plej grandaj en la mondo antikvaĵoj de milita arkitekturo estis en la XV-a jarcento. Multfoje plikonstruata, potenca stratega fortikaĵo gardis dum jarcentoj la pordegon de nia Respubliko. Ĝi estas netaksebla memoraĵo de la mara historio de Pollando. Jen de tiu-ĉi loko en la jaro 1627 navigaciis la pola floto al venka batalo kun svedoj apud Oliwa. Revenantajn ŝipojn bonvenigis kanonaj pafoj el la bastiono kaj flirtanta super la fortreso karmezina flago kun la pola blanka aglo.









Bastiono „Grodzisko”

**Bastiono „Grodzisko”**

Sur 20-hektara spaco de la Bastiono „Grodzisko” kreiĝas la Pomeria Prezentada Centro de Scienco kaj Tekniko „Hevelianum”.

Kruco de Miljaro

**Tombejo de Neekzistantaj Tombejoj**

Dum jarcentoj Gdańsk estis siaspeca burĝa respubliko, kunmetita etna fandvazo, loko de konsente kaj kree kunekzistantaj kulturoj, religioj kaj lingvoj. Loĝis tie-ĉi poloj, germanoj, nederlandanoj, skotoj, judoj, angloj; protestantoj, katolikoj, judoj, hugenotoj, menonitoj. Ĝi estis urbo tolerema kaj malfermita, lerte enkomponiganta diversajn variecojn en propran, neripeteblan pejzaĝon. La Tombejo de Neekzistantaj Tombejoj estas supertempa signo de la daŭro kaj estimo de la hodiaŭa generacio al tiuj, kiuj en pasinteco kreis la socion de Gdańsk.










## Bastiono „Grodzisko” (30)


Same gravan rolon en historio de la urbo ludis la unika komplekso da objektoj de milita arkitekturo. La fortikaĵo estas situita sur tereno de la Gdanska Fortresa Kultura Parko de Urbaj Fortikaĵoj kaj ĝia komenco atingas la XVII-an jarcenton.Ĝia historio estas ankaŭ ligita kun la fama sieĝo de la urbo per rusa armeo en la XVIII-a jarcento finiĝita pro atako de napoleona armeo sub la gvidado de marŝalo Lefebvre en la jaro 1807 kaj la tuta malvenko de agresantoj. La imperiestro Bonaparte mem konstatante, ke „Gdańsk estas ŝlosilo al ĉio”, kaŭzis al modernigo de la fortikaĵo kaj konstruo de potenca kazemata artileria baterio - t.n. Napoleona Reduto.


## Kruco de Miljaro (31)

Sur la Jerosalema Bastiono de la Bastiono „Grodzisko” troviĝas videbla super Gdańsk jam de la maro grandega kruco, kiu estis starigita por memorigi 2000 jarojn de kristanismo, miljaron de la grandega bapto de gdanskanoj fare de la Sankta Adalberto kaj miljaron de la urbo, solene celebritaj en la jaro 1997.

## Tombejo de Neekzistantaj Tombejoj (32)

Escepta en sia esprimo kaj interesa en formo monumento memorigas neekzistantajn jam en Gdańsk lokojn de entombigo, detruitajn de tempesta historio kaj militaj malpacoj. Oni establis ĝin omaĝe al ĉiuj sennomuloj de multaj religioj kaj nacioj, kiuj en Gdańsk vivis kaj mortis. Tiu nerenkontata nekropolo simbole interligas al plano de preĝejo, kiun kreas vivaj arboj, ŝtonaj kolonoj en formo de krevantaj mortintaj trunkoj, granita plato de la ofera altaro apogita sur restaĵoj de malnovaj tomboŝtonoj.









**Monumento al la Defendantoj de Pola Poŝto**

La Monumento al la Defendantoj de Pola Poŝto sugeste prezentas vunditan poŝtiston super la disjetita sendaĵo, transdonantan karabenon al la diino de venko Nike.



**Monumento al la Defendantoj de Westerplatte**

Germana militista komendantaro opiniis konkeron de Westerplatte facila tasko. Kaj tamen malgranda taĉmento da polaj soldatoj defendis persiste tiun terpecon dum 7 tagoj, per kio ĝi vekis estimon de malamiko, kiu akceptis kapitulaciantan komandanton, majoron Henryk Sucharski, kun honoroj.



## Konstruaĵo de Pola Poŝto (33)

Iama militista lazareto el 1844 j. estis sidejo de la pola Direkcio de Poŝtoj kaj Telegrafoj en la Libera Urbo Gdańsk. Ĝi transiris al historio lige kun tragikaj okazintaĵoj de la defendo de Pola Poŝto en septembro 1939 j. Hodiaŭ en la konstruaĵo troviĝas la Muzeo de Pola Poŝto havanta eksponatojn montrantaj historion de poŝto en Gdańsk tra jarcentoj, historion de tekniko de telekomunikado kaj dokumentojn memorigantaj heroecon de poŝtistoj. Apude oni fondis plenan da ekspresio kaj dinamiko Monumenton al la Defendantoj de Pola Poŝto (34). Alia loko dediĉita ankaŭ al ilia martirologio estas la Tombejo en la distrikto Zaspa kaj troviĝanta tie la Monumento al la Viktimoj de Faŝismo.

## Monumento al la Defendantoj de Westerplatte (35)

Ĵus en Gdańsk la 1-an de septembro 1939 j. je la 4.45 horo per pafoj el la kirasŝipo Schlezwig-Holstein komenciĝis la Dua Mondmilito. Heroa, senekzempla batalo de 182-persona taĉmento de la gardejo en Westerplatte sub la komando de majoro Henryk Sucharski iĝis la simbolo de pola rezisto kontraŭ hitlerana agresanto. Fondita omaĝe al defendantoj de Gdańsk la ŝtona monumento, elkreskanta el granda verda ŝutmonteto ĉe la eniro havenon, rememorigas enbatitan en la teron per tenilo glavon. Tiun-ĉi memorindan okazintaĵon dokumentas ekspozicio en la proksima Gardejo n-ro 1.













**Monumento al la Pereintaj Ŝipfarejlaboristoj**

En la 80-aj jaroj de la XX-a jarcento antaŭ la Monumento de la Pereintaj Ŝipfarejlaboristoj okazadis demonstracioj de la membroj de „Solidarność" brutale dispelataj de milico.

# Muzeo de Solidareco

**Muzeo de Solidareco**

La 30-an de Aŭgusto 2003 j. la Tabuloj kun 21 postuloj, enlistigitaj dum la striko en la Gdanska Ŝipfarejo, estis enskribitaj en la liston de UNESCO „Memoro de la Mondo".





## Monumento al la Pereintaj Ŝipfarejlaboristoj (36)


Majestaj tri krucoj kun ankroj - simboloj de espero - memorigas sangajn viktimojn de laboristaj strikoj de Decembro 1970. La postulo de konsento por starigi monumenton ĉe la pordego de ŝipfarejo estis unu el la plej gravaj postuloj de strikantaj gdanskaj ŝipfarejlaboristoj en Aŭgusto 1980. La krucoj, faritaj de la ŝipfarejlaboristoj mem el rustrezista ŝtalo, estas 42 m. altaj kaj pezas preskaŭ 140 tunojn. Ĉe la piedoj de la monumento metas florojn ĉiuj oficialaj delegacioj vizitantaj Gdańsk.

## Muzeo de Solidareco (37)

Fascinanta multimediala ekspozicio „Vojoj al Libereco" en la historia Salonego pri Industria Sekureco (BHP) de la Gdanska Ŝipfarejo, proksime al la Monumento al Pereintaj Ŝipfarejlaboristoj, prezentas tempestajn historiajn okazintaĵojn de la lasta kvaronjarcento - batalojn de poloj por libereco kaj justeco. Troviĝas tie i.a. la famaj Tabuloj kun 21 postuloj el Aŭgusto `80 skribitaj mane sur du tavollignaj platoj. Laŭ decido de UNESCO ili estas enskribitaj en la liston „Memoro de la Mondo" kiel dokumento de esceptaj sociaj kaj humanaj valoroj kaj de signifa influo en la historion de Eŭropo. Pecoj de la historia Berlina Muro kaj de la ŝipfareja muro, kiun iatempe transsaltis Lech Wałęsa, rememorigas kia estis komenco de la vojo al libereco en tiu-ĉi parto de Eŭropo.











**Palaco de Abatoj (39)**

En la Palaco de Abatoj funkcias la Filio de Nuntempa Arto de la Nacia Muzeo. La konstanta Pola Galerio prezentas kolektojn dokumentantaj polan arton post la jaro 1945. Nuntempe en la ekspozicio troviĝas ĉirkaŭ 200 verkoj de la plej geniaj polaj artistoj.

## Katedralo en Oliwa (38)

Oliwa - kvieta, ĉarmema gdanska kvartalo, pitoreske enpuŝita en la arbaran regionon de la Triurba Pejzaĝa Parko, estis priskribita de la fama mondvojaĝanto Alexander von Humboldt kiel la tria plej bela loko en la mondo. Ĝi distingiĝas pro la majesta postcisterciana parko projektita de la majstro pri ĝardena arkitekturo - Andre La Norte. Ĝia ekesto atingas la XVIII-an jc. kaj komencon de la XIX-a jc. La areo estas dividita en du diferencajn partojn: francan ĝardenon kaj anglan parkon. Nuntempe ni povas admiri priskribitan de J. I. Kraszewski karpenan aleon, kiel ankaŭ aranĝitan en la 1920 j. alpan ĝardenon, oranĝerion, groton kaj kaskadon. Promeno inter altaj, multjaraj arboj kaj raraj valoraj specoj de plantoj gvidas nin al la Katedralo de Oliwa. Konstruita kiel la cisterciana preĝejo en la XIII-a jc. gotika, trinava, volbita baziliko, bazita sur la plano de la latina kruco, estas 107 m longa kaj ĝi estas la plej longa preĝejo en Pollando.

En belaj internoj ĝi kaŝas multajn trezorojn de arto, ekzemple barokan ĉefan altaron kaj dudek flankajn altarojn, rokokan predikejon, majestajn stalaojn (ornamitajn preĝbenkojn), renesancajn portretojn de multaj bonfarantoj al la klostro de Cistercianoj. Vera ornamo de la Katedralo estas la fama rokoka orgena prospekto konstruita de la Majstro Jan Wulf kaj Frederick Rudolf Dalitz. La kvalito de ĝia sono kun specifa efekto de eĥo estas nevalorebla. Escepteco de la orgeno estas moviĝantaj dekoracioj - steloj, trumpetoj kaj sonoriloj de anĝeloj, kiuj povas esti movigataj dum la ludo.









# Elektitaj konstantaj kulturaj okazintaĵoj





## Elektitaj konstantaj kulturaj okazintaĵoj:

**Gdanska Muzika Somero** (julio-aŭgusto)
Ciklo da koncertoj de klasika muziko kun partopreno de mondaj geniuloj en la ĉarma ĉirkaŭaĵo de la amfiteatro apud la rivero Motława.

**Internacia Festivalo de Orgena Muziko en la Katedralo en Oliwa** (julio-aŭgusto)
Malnovaj kaj premieraj hitoj de orgena muziko fare de mondfamaj virtuozoj.

**Internacia Festivalo de Orgena, Korusa kaj Kamera Muziko** (julio-aŭgusto)
Vendredaj koncertoj de orgenistoj, korusoj kaj solistoj, kameraj ensembloj kaj simfoniaj orkestroj en majestaj internoj de la Baziliko al S-ta Maria.

**Internacia Festivalo de Eksteraj kaj Strataj Teatroj** (duono de julio)
Grandaj kaj etaj teatraj spektakloj en antikva ĉirkaŭaĵo de gdanskaj angulstratetoj.

**Internacia Renkonto de Velŝipoj „Baltic Sail"** (dua parto de julio)
Multkolora festeno de veloj en la historia centro de Gdańsk: regataoj, paradoj de altaj velŝipoj kaj la festivalo de maristaj kanzonoj.

**Gdanska Karilona Festivalo** (interrompo de julio kaj aŭgusto)
Trarigardo de verkoj de la riĉa karilona muzikliteraturo de baroko ĝis nuntempo.

**Shakespear`a Festivalo** (la unua dekado de aŭgusto)
Internacia trarigardo de la plej interesaj teatraĵoj de nevaloreblaj dramoj de la Majstro el Stratford.

**Foiro de S-ta Dominiko** (unuaj tri semajnoj de aŭgusto)
Plena da fantazio populara gdanska festeno, devenanta el la XIII-a jc., kun riĉa programo de kulturaj eventoj.

**Festivalo „Sonoj de Nordo"** (duone de aŭgusto)
Koncertoj de muziko inspirita de folkloro. En tradicio de festivalo - komunaj prezentiĝoj de ĵazmuzikistoj kaj popolaj artistoj.

Kalendaro de eventoj kaj turista bazo: *www.gdansk.pl*














# Centro de Gdańsk

1. Altaĵa Pordego
2. Antaŭpordegejo al la strato Longa
3. Granda Arsenalo
4. Kortego de la Frataro de S-ta Georgo
5. Ora Pordego
6. Domo de Uphagen
7. Urbodomo de la Ĉefa Urbo
8. Fontano de Neptuno
9. Kortego de Artus
10. Nova Domo de Ĵurio
11. Ora Domo
12. Verda Pordego
13. Preĝejo al S-ta Maria
14. Reĝa Kapelo
15. Preĝejo al S-ta Nikolao
16. Preĝejo al S-ta Katarina
17. Preĝejo al S-ta Brigita
18. Preĝejo al S-ta Johano
19. Preĝejo al S-ta Elizabeta
20. Preĝejo al S-ta Jozefo
21. Preĝejo al S-taj Petro kaj Paŭlo
22. Preĝejo al S-ta Triunuo
23. Nacia Muzeo
24. Urbodomo de la Malnova Urbo
25. Granda Muelejo
26. Gruo
27. Nacia Mara Muzeo
28. Lumturo
29. Fortreso Vistulenfluejo
30. Bastiono „Grodzisko”
31. Kruco de Miljaro
32. Tombejo de Neekzistantaj Tombejoj
33. Konstruaĵo de Pola Poŝto
34. Monumento al la Defendantoj de Pola poŝto
35. Monumento al la Defendantoj Westerplatte
36. Monumento al la Pereintaj Ŝipfarejlaboristoj
37. Muzeo de Solidareco
38. Katedralo en Oliwa
39. Abata Palaco

Oliwa 38 39 Nowy Port 28




tessa © Tessa tel. 0 600 075 458 fax (058) 552 20 97

29 35 Westerplatte

GDAŃSK

*www.gdansk.pl*

Eldonanto: Departamento de Promocio de la Urbo
Urba Ofico en Gdańsk
ul. Nowe Ogrody 8/12
PL 80-803 Gdańsk
Tel. (+48 58) 323 71 10
e-mail: umg@gdansk.gda.pl

Fotoj: S. Składanowski, M. Żak, A. Firynowicz, K. Gollnau, W. W´grzyn, D. Kula, S.J. Michalak, Kosycarz Foto Press, arkivo de la Departamento de Promocio de la Urbo.

Eldonanto dankas al: s-ro S. J. Michalak, s-ro L. Myrta, Historia Muzeo de la Urbo Gdańsk, Nacia Muzeo en Gdańsk, Fondo de la Centro de Solidareco, Biblioteko de Pola Akademio de Scienco en Gdańsk kaj Eldonejo TESSA Sp. z o.o. pro permeso uzi iliajn materialojn kaj fotojn al tiu-ĉi publikigo.